Netiketo de video-renkontiĝo

Esence

- Netiketo – tio estas reguloj pri decaj kaj respektaj agmaniero kaj konduto en interreta ĉirkaŭaĵo.
- Mia renkontiĝo, miaj reguloj.

Preparado

- Provu la teknikaĵojn (lumilo, kamerao, mikrofono, laŭtparolilo) eble kun via smartfono kiel distanca stacio. Vi povas uzi la Jitsi-kanalon sen mia ĉeesto. Mi ankaŭ pretas kontroli viajn (kaj miajn) agordojn kaj aparatojn iam antaŭ video-renkontiĝo kun ebla partoprenonto.
- Konu almenaŭ proksimume la eblecojn de la programo (ŝalti/malŝalti kameraon kaj mikrofonon, surekrana aranĝo: ŝalti/malŝalti kahelan vidon, ŝanĝi retumilan fenestron, malfermi la skrib-babilejon (chat), uzi blanktabulon, uzi manlevan signon).
- Deca ĉirkaŭaĵo (lumo, fono).
- Atentu la bildosegmenton, agordu la kameraon laŭ okulnivelo (stako da libroj aŭ ŝuujo sub la kamerao aŭ klapkomputero helpas vin).
- Deca vesto (Ĉiam surmetu pantalonon, ĉar vi ne scias, kio okazos.). Atentu respektive pri blankaj vestoj (ĉemizoj, bluzoj) sur blanka fono (murpapero) kaj ĝenerale pri unukoloraj (ruĝa, blanka, blua) vestaĵoj.
- Persona konduto (akurateco, afableco).

Efektivigo

- Mi petas, ke la partoprenonto ŝaltu la kameraon!
- Ensalutu kun via vera nomo kaj eble loĝloko/ŝtato.
- Mi ne atendas pli ol ses partoprenantojn.
- Fokuso sur la renkontiĝo, sen plurtaska agado.
- Se eble, nenia intervena ĝenado de triaj partioj.
- Se estas pluraj partoprenantoj:
    - Mutigu mikrofonon.
    - Uzu la manlevan signon aŭ anoncu vin en la skrib-babilejo, se vi volas paroli en la video-renkontiĝo. Mi decidas, kiu parolas kaj en kiu ordo.
    - Limigu paroltempon al 5 minutoj, parolu klare kaj malrapide, lasu parolanton fini.

Adiaŭo

Mallonga elsaluto per la skrib-babilejo sufiĉas.

Por anima pripariĝo

https://www.youtube.com/watch?v=Hrqn-ONMrro

Kontrollisto

- ☐ Programo: Miaj video-renkontiĝoj havas datofalon en Gugla Kalendaro kun sciigo per retpoŝto (15 minutoj antaŭe) kaj rekta mesaĝo (10 minutoj antaŭe), ambaŭ informojn ricevas ankaŭ la aphorloĝo.
- ☐ Kontrolu vestaĵojn.
- ☐ Instalu aŭ lanĉu la programon aŭ malfermu la konforman paĝon en la retumilo (Ĉiu programo de video-renkontiĝoj funkcias en la retumilo, ne necesas instalado.).
- ☐ Agordu la ĝustan kanalon / konferencan kodon en la programo (*Jitsi*: XXX; *Google Meet*: aaa-aaaa-aaa).
- ☐ Se necese, ŝaltu lumilon (se eblas, apliku nerektan lumon, eĉ se vi laboras per ringa lumilo; se necese, direktu artefaritan lumfonton ne rekte al la homo, sed al hela, kontraŭa muro por krei difuzan lumon; homoj, kiuj portas okulvitrojn kiel mi, atentu reflektojn de la lampo en la okulvitroj)
- ☐ Ŝaltu la kameraon, elektu la ĝustan aparaton, se estas pluraj kameraoj; Kontrolu la lampajn reflektojn menciitajn supre.
- ☐ Ŝaltu la mikrofonon kaj elektu la ĝustan aparaton, se estas pluraj mikrofonoj.
- ☐ Ŝaltu aŭd-eliron, faru la ĝustan elekton, se estas pluraj laŭtparoliloj/aŭdiloj, se necese kontrolu la eliron kaj laŭtecon per
  - ☐ "Tripunkta-Menuo > Agordoj > Aŭdado > **prova tono**" (*Jitsi*),
  - ☐ "Tripunkta-Menuo > Agordoj > Aŭdado kaj Video > ▹ **Aŭdotesto**" (*Skype*) aŭ
  - ☐ "Tripunkta-Menuo > Agordoj > laŭtparolilo > **Testi**" (*Google Meet*);

  Evitu rekupladon.
- ☐ Kiel gvidanto de la video-renkontiĝo mi estas enreta 5 minutojn, antaŭ la efektiva komenco de la rendevuo.

2023-12-11 **Michael Lennartz** (versio 2.5)

Die internationale Sprache
: // Esperanto
La internacia lingvo